Aprilo 1954. Nro 8.

# LA JUNA VIVO

MONATA GAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO"

*Redakcio: S-ino E. Burgler, Geleen, Markt 64, Nederlando*
*Administracio: K. Kranenburg, Steenschuur 10, Leiden, Nederlando*
*Sekretariejo de TEJO: Juliana van Stolberglaan 9, Naarden, Nederlando*
*Ĝiro de TEJO Nro 537168* *Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro*

## ĈU LJV NE PLU APEROS?

### Perantoj grave malzorgas sian laboron.

Pro la fakto, ke la estraro jam dum longa tempo ne disponas pri mono, ĝi estas devigata, se la cirkonstancoj ne ŝanĝiĝos, ĉesigi la eldonadon de nia organo LJV. Tiuokaze vi ricevis la aprilan kiel la lastan nron antaŭ la kongreso. Ĉi tiu aranĝo estas necesa pro la gravaj ŝuldoj kiujn TEJO havas ĉe la presisto de la revuo, ĉe la nederlanda sekcio kaj ĉe diversaj estraranoj kaj kunlaborantoj. Ĉar ni ne kuraĝas porti plian respondecon sur niaj jam mallarĝaj ŝultroj, ni venis al ĉi tiu malĝojiga decido.

Malgraŭ la fakto, ke ni antaŭ kelka tempo forsendis „La Peranto-n inter la Perantoj" en kiu ni urĝe petis baldaŭn transsendon de la eksterlanda mono al Nederlando, ŝajnas, ke neniu el la perantoj opinias ĉi tiun alvokon sufiĉe grava por tuj obei ĝin. Krom la monon ni petis membrolistojn. Ili ne venis. Certe mi scias, ke LJV estas sendata al multaj personoj, kiuj ek de septembro ne plu estas membroj. Diversaj mem skribis tion, aŭ resendis la gazeton. Sed kion pensi pri tiuj kiuj ne faris tion? La presigado kaj la forsendo de gazetoj al tiuj personoj signifas nuran perdon, perdon de mono, kiun ni por aliaj celoj ege bezonas.

Kelkaj faktoj eble konvinkos vin, ke **TEJO staras apud abismo, en kiu ĝi nesaveble pereos, se la perantoj ne ekaktivas.**

Ŝuldo al sro Muusses, la presisto pli ol 1000.— guldenoj, ŝuldo al la ned. sekcio 106.50 guld. ŝuldo al la nederlanda peranto. kiu ekspedas LJV-n, 11.44 g. ŝuldo al la prez./sekr. 20.— guld.

Dum la pasinta duonjaro TEJO akiris multajn novajn membrojn. Kvankam diversaj ekmembriĝis ek de septembro 1953a, pluraj ĝis

nun ne ricevis LJV-n pro la simpla fakto, ke iliaj nomoj kaj adresoj ne estis konigataj al la administrejo de la koncerna peranto. Kompreneble deziras tiuj membroj ricevi la nrojn de septembro ĝis nun, sed nia stoko de tiuj malnovaj nroj estas elĉerpita. Por tiuj personoj ni klopodos trovi kontentigan solvon.


Rilate al la plendoj pri la taga estraro mi aldonu al la frontpaĝa artikolo de la antaŭa nro, ke la taskodivido de la tagaj okupaĵoj de TEJO estas jena: prez/sekr./solvanto de financaj problemoj kaj membro de L.O.K.: Tammo Kanter. Kasisto: la funkcio vakas. La kaslibron prizorgas la malnova kasisto, Geert de Vries, kiu pro studado ne povas dediĉi plian tempon. Administracio: la nederlanda peranto Koos Kranenburg prizorgas la administradon, la ekspedon de LJV kaj la forsendon de la „Peranto inter la Perantoj" kaj la kontaktorganon de CKEJN (Centra Komitato de la Esperantista Junularo en Nederlando) al la nederlandaj membroj.

Redakcio: S-ino Burgler.

Ni esperas, ke la membroj per la ĉi supraj sciigoj ekhavas ideon pri la malforto, kiu momente reprezentas TEJO-n, ke ili komprenas, ke la taga estraro (konsistanta el ununura persono: Tammo Kanter) ne povas rompi feron per la manoj, sed ke ĝi faras sian eblon ordigi ĉion kiel eble plej baldaŭ kaj kiel eble plej bone.

**PERANTOJ! Sendu la kotizon al la Penningmeester TEJO, ĝiro nron vidu sur la frontpaĝo), ne al la administracio.**

Tammo Kanter, prez.




*Nia kongresejo. La klarigojn vidu sur p.*

(Afable disp. de ĉevalsport-unuiĝo en Hilversum).

## Nia Junularmovado endanĝeriĝas.

Ke la situacio de la Esperanto-Junularmovado kaj speciale de TEJO ne estas favora, vi povis konkludi el diversaj tiutemaj artikoloj, kiuj ripetfoje aperis en nia gazetaro. Tamen, ĉu estas konata al la plimulto de ni la fakto, kiom severe malbone nia afero statas? Ĉu la plimulto de ni konscias, ke minacas katastrofo, se ni ne dediĉas profundan atenton al la solvo de la problemoj? Mi dubas pri tio des pli, ĉar en la antaŭaj nroj de nia organo mi ne trovis ĝis nun klaran alarmkriojn, kiuj atestas, ke ni atingis la krizon. Estas ĉi tiu dubo, kiu igas min preni la plumon por emfaze atentigi je diversaj faktoroj kaj por fine doni kelkajn proponojn, kiuj laŭ mi povas konduki al sana junularmovado.

Mi ne volas supozi, ke koncerne nian aferon ekzistas indeferento ĉe la membraro. Ne necesas vaste skribi pri la signifo de bone fartanta Esperanto Junularmovado. Ni ja ĉiuj scias, ke iam venos la tempo (almenaŭ ni devas kalkuli je tio!) kiam la nunaj pli aĝaj samideanoj devos esti anstataŭataj. Kaj ju pli granda estas la fonto el kiu ni povas ĉerpi, des pli efike povas esti elektataj la taŭgaj gvidantoj. Ni, la junularo, estas la estonteco kaj nia malsukceso kunportos samtempe la malsukceson de la E-movado ĝenerala! La problemo do meritas ĉies seriozan intereson.

Pritraktante la junularproblemon el la vidpunkto de TEJO, mi samtempe grandparte tuŝas la Esperanto-Junularproblemon ĝenerale.*

Mi ne bezonas priskribi la nunan malesperigan staton de TEJO. Vi povas pri tio legi en la ĉefartikolo de nia prezidanto, Tammo Kanter. Tamen mi devas montri je du faktoj, kiuj bone skizas la grandan embarason en kiu ni troviĝas:

1e. La lastajn jarojn la membronombro grave malkreskis kaj ankoraŭ ĝi ne estas stabila;

2e. el la nuna membraro ŝajnas esti neebla elekti kompletan estraron, la minimumon, kiu estas necesa por vivteni organizon, kiel la nian.

Ke ĉi ĉio tre malbone influas la kason, vi povas kompreni.

Kiam ni nun serĉas la kaŭzojn de la malprospero, ni surpaŝas terenon aktualan kaj treege vastan. Ĉar ligitaj kun tiuj kaŭzoj ne estas nur la interna agado en- kaj la organiza sistemo de TEJO, sed samtempe la sinteno, de la nuntempa junularo koncerne Esperanton, alivorte: la junularproblemo.

Mi postulus tro multan lokon, se mi ne iom koncize esprimus mian opinion pri nomitaj kaŭzoj.

La interna agado en TEJO, t.e. la laborado de la malmultaj aktivuloj, do fakte de la gvidantoj, plej ofte estas la punkto, sur kiun falas la kritiko. Sed esence tio estas eraro, ĉar la interna agado estas streĉe asociata kun la junularproblemo. Ĉi tiuj faktoroj direktas la laboron en la organizo. La junularproblemo ne efike povas esti atakata, kiam la organiza sistemo ne estas ĝusta. Kaj ĉi tiu sistemo efektive ne taŭgas, sed tio ne donas rajton imputi la estraron pro la malbona funkciado de la aferoj.

Kia estas la organiza sistemo de TEJO? Ĝi estas tia, ke krom la ĉefestraro kaj redaktor(in)o de LJV estas nur la perantoj, kiuj (iom)

kontribuas al la por-organiza laboro. La rilato inter organizo kaj membroj enhavas do la legadon de la dekfoje po jare aperanta revuo „La Juna Vivo". Ĝi estas la sola ligilo inter la gejunuloj kaj Esperanto.

Tamen tiuj, kiuj lernis la lingvon, bezonas pli, ol tiujn dek organojn! Ili devas havi la okazon regule paroli la lingvon kaj tio eblas nur en lokaj *rondoj*. En tiuj kluboj la anoj povas esti facile informataj pri ĉiuj sciindaĵoj rilate Esperanton kaj en tiuj kluboj oni povas organizi varbadon por pligrandigi la membronombron. Ĉi tie ili krom al la pli seriozaj laboroj povas kaj devas dediĉi multan atenton al la multflanka amuzado. Tiam la gejunuloj *vivas* en Esperantujo. Organizitaj en lokaj rondoj la membroj multe pli emas viziti regionajn, naciajn kaj internaciajn renkontiĝojn, ĉar nun ili vojaĝas kune - kaj ĉu tiam ili ne pli facile kontribuas al nia organizo? Internacia unuiĝo kun tiaj societoj estas unuiĝo vivanta en la vera senco de la vorto! Nun ankaŭ nia Informa Fako, kiu laboras sur la tereno de la propagando, povas efike labori. Ĉar ĝia tasko povas esti nur gvida, ĝi povas helpi konsile kaj materiale la rondojn je ilia varbado de novaj anoj. Same la Dokumentado kaj Gazetarservo kaj la Vojaĝservo havos pli da kunlaborantoj, resp. interesitulojn.

Mi scias, ke nenie en nia regularo la formado de menciitaj rondoj estas malpermesitaj, tamen *intence* ni devas labori en tiun direkton. Tio ne estas simpla tasko, precipe ĉar ofte ni unue devas varbi la gejunulojn, do ekinterresigi ilin pri Esperanto.

Kaj nun mi atingas la trian punkton, le plej gravan, nome: la junularproblemon.

Ofte aŭdata plendo estas, ke la hodiaŭa junularo ne plu havas idealojn, aŭ ke ĝi ne estas interesigebla je idealoj. Povas esti, ke la antaŭmilitaj gejunuloj efektive estis pli idealismaj, ja militoj ne faras nin tiaj. Mi ne povas prijuĝi tion, ĉar tiam mi estis tro juna. Por ni ĉi tie estas unualoke grave, kiom (ankoraŭ) la juna generacio interesiĝas pri Esperanto.

Krom la pro militaj kaŭzoj diversaj faktoj la lastan jardekon sendube malbone influis tiun interesiĝon. Post la milito la internaciaj rilatoj pli ol iam antaŭe abundas. La angla lingvo prenis gravan lokon en multaj okcidenteŭropaj landoj kaj kelkloke ĝi eĉ pli-malpli fariĝis modo. Anglalingvaj korespondkluboj kaj vojaĝoficejoj en certa grado fariĝis konkurantoj de ni. La propagandilo de la esperantistoj „internacieco" ne plu havas tian misteran kaj allogan sonon kian iam antaŭe. Krom tio la junularo nun ĝis pli alta aĝo studas kaj bezonas ĉiun tempon tiucele.

Do povas esti, ke efektive la kategorio, kiu estas varbebla por nia idealo, malpli grandiĝis. Aliflanke pro la progreso de la internaciiĝo multaj homoj sentas, ke ekzistas lingvoproblemo. Ili tamen ne konstatas, ke Esperanto estas la taŭga solvo, antaŭ ol ili lernis la lingvon. Ĉi ĉio signifas, ke ni ofte tuj devas propagandi per pli seriozaj argumentoj, kaj ke ni devas fari tion grandskale. Ja ju pli malgranda estas la konvinkebla grupo, des pli grande ni propagandu por almenaŭ atingi ilin. Multaj semoj perdiĝos, sed la rikolto estas sufiĉe sukcesa por formi sanan junularmovadon, kondiĉe ke la semado kaj posta direktado okazu ĝuste.

Ĉi tio estas aparta ĉapitro. Skribi

pri tio signifus skribi spertojn kaj tio ne estas la tuja intenco mia.

Pro la vasteco kaj multflankeco de la temo tiuj spertoj estas tre relativaj. Nur per la spertoj de multaj personoj ni povos indiki la plej ĝustan labormetodon. Kaj tiun ni devos apliki laŭ la cirkonstancoj.

Estas tial, ke mi plej forte alvokas la tutan Esperantistaron por kunlaboro en granda kaj grava entrepreno. Mi proponas:

1e: Ĉiuj samideanoj, kiuj havas kelkjaran sperton pri la Esperanto-Junularmovado raportu pri tio kaj ili aldonu siajn opiniojn koncize.

2e: Dum internacia kunveno, ekz. la TEJO-kongreso, la raportoj estu pristudataj kaj komparataj.


3e: Dum tiu kunveno oni fiksu definitan labormetodon kaj oni esploru la eblecojn por veni al pli firma kunlaboro inter la diversaj pli grandaj junularmovadoj Esperantistaj.

4e: La gvidadon de la kunlaboro havu ekz. iu estrarano de TEJO.

Mi ne scias, ĉu la proponoj estas efektivigeblaj.

Tamen mi sincere esperas, ke mi ne vane verkis ĉi tiun artikolon kaj ke ĉiu konscias, ke grave endanĝeriĝas nia komuna afero. Ke tio ekmovigu vin!

Felix H. Kat.



*Fortikaĵo de Naarden, apud Hilversum.*

(Afable disp. de V.V.V. Hilversum).

Kiam, en novembro pasintjara, ni decidis proponi al la T.E.J.O. estraro okazigi la 10an Internacian Junular-Kunvenon de T.E.J.O. en Hilversum, ni preskaŭ sciis nenion pri tia kongreso. Ni sciis nur, ke Hilversum situas ekstreme favore por internacia kongreso, en la centro de Nederlando kaj facile atingebla el la plej multaj Eŭropaj landoj. Ni ankaŭ kuraĝis diri, forŝovante ĉiun ŝovinismon, ke nia loĝejo estas bela kaj vizitinda, tion pruvas ĉiujare la granda nombro da en- kaj eksterlandaj turistoj. Sed cetere niaj ideoj estis ankoraŭ nebulaj, ni ne havis klaran bildon pri la programo, pri la prezoj k.t.p.

Ek de novembro ni multon faris, kaj malaperis unu post la alia la demandsignoj. Ni ofte kunvenis, pridiskutis la programon, la prezojn, traktis leterojn kaj priparolis tiujn multajn aferojn, kiuj rilatas la organizadon de kongreso. Kaj iom post iom ni formis al ni bildon ĉiam pli klaran pri la multaj okazaĵoj, kiuj kune formos la dekan Internacian Junular-Kunvenon de T.E.J.O.

Jes, por ni multaj demandoj estas responditaj, sed ĉu ankaŭ vi estas tiom bone informitaj? La poŝtisto regule alportas la respondon al ĉi lasta demando: „mi petas vin sendi detalajn informojn pri la programo k.t.p." ......... "kaj mi tre ŝatus scii, ĉu partoprenos ankaŭ aliaj infanoj, tiom junaĝaj". ......... „leginte vian anoncon en „Esperanto-Post", mi ŝatus ricevi pliajn informojn pri la kongreso" ...... Kaj mi eksidas malantaŭ la skribmaŝino kaj respondas.

Ofte montriĝas, ke oni ne atente legis la informojn en L.J.V. kaj evidente forgesis la komunikojn de antaŭ unu aŭ du monatoj kaj ofte ankaŭ montriĝas, ke oni deziras esti tre detale informita, antaŭ ol decidi pri partopreno. Tio estas komprenebla, multaj el ni laboras dum la tuta jaro kaj ne volas riski fiaskiĝon de la kelksemajna ferio.

Tial, kaj ankaŭ pro aliaj kaŭzoj, ni publikigas ĉi tiun detalan artikolon, por ke vi sciu ĉion, aŭ preskaŭ ĉion. Mi volas rakonti vin pri la organizado, pri la programo, pri la kongresejo, pri la radiourbo Hilversum, kiu gastigos nin kaj pri ankoraŭ aliaj aferoj, kiuj eble interesas vin. Tial, trankvile eksidu kaj legu, kaj tenu vian aliĝilon ĉemane, por ke tuj vi povu ĝin plenigi, se vi ankoraŭ ne faris tion.

NI KOMENCU ĈE LA KOMENCO

do ni diru en oktobro pasintjara. Tiam mi foje parolis kun nia T.E.J.O. prezidanto, Tammo Kanter, pri la venontjara kongreso. Ne decidis oni pri la loko de nia deka, Tammo rakontis al mi. Invitoj venis el Germanio kaj Francio, sed la Universala kongreso okazos en la nederlanda urbo Haarlem kaj ĉu ne multaj dezirus post la T.E.J.O. kongreso viziti ankaŭ tiun manifestacion? Kial do ni ne invitu la T.E.J.O. anaron veni al Hilversum, mi diris. Nederlando ja situas meze en Eŭropo kaj Hilversum estas, kiel radiostacio, konata en la tuta mondo. Ni ankoraŭ iom sonĝis pri la ideo kaj entuziasme ekmemoris antaŭajn junularkunvenojn esperantistajn. Kiam ni disiris, nenio estis decidita, sed la ideo ne plu forlasis nin.

Kelkajn semajnojn poste okazis en Putten, vilaĝo en la centro de Nederlando, renkontiĝo de junaj esperantistoj kaj tiuokaze ni denove ekparolis pri la okazigo de T.E.J.O.

kongreso en Hilversum. La ĉeestantaj membroj el Hilversum estis kvazaŭ sorĉe allogitaj de la ideo kaj principe la afero estis jam bonorda, restis tamen nur unu demandsigno:

LA KONGRESEJO!

Jam en antaŭaj numeroj de L.J.V. mi skribis, ke Hilversum ne estas tre granda urbo, la nombro da enloĝantoj estas nur preskaŭ 100.000, ĉu ni sukcesos en nia loĝurbo trovi taŭgan kaj ne tro multekostan ejon por akcepti la kongreson kaj krome, ĉu en nia urbo, kiu ĉiujare estas plenplena je turistoj, ni trovos sufiĉe da dormlokoj? Post la renkontiĝo en Putten ni rapidpaŝe esploris ĉiajn eblojn kaj fine ni sukcesis lui la Komunuman Sporthalon. Jes, eĉ pli da sukceso ni havis, la komunumestraro, kiu decidas pri la Sporthalo, cedis al ni 50% de la luprezo.

En la Sporthalo ni aranĝos, helpataj de registrara laborentrepreno, grandan amasdormejojn. La entrepreno liveros al ni la necesajn litojn kaj la Nederlanda Ruĝa Kruco pruntedonos al ni litkovrilojn, por kiuj ni nur devas pagi la kostojn de purigo post la kongreso. Sub sama tegmento estas la restoracio de la Sporthalo, en kiu ni uzos ĉiujn manĝojn. Entute do tre favora aranĝo, ni dormos, manĝos kaj kunvenos en unu konstruaĵo kaj dum la tuta kongreso restos kune.

LA PROGRAMO

tiam postulis nian atenton. La nederlandanoj havas bonan famon en Esperantio pri la organizado de kongresoj kaj ni kompreneble ne deziras nuligi tiun famon. La programo sendube estas la plej grava parto de la kongreso; pri malbonaj litoj oni grumbletas, pri nesufiĉa manĝaĵo oni protestas, sed pri malbona programo oni grumblegas. La litoj estas bonaj, do pri tio ni ne plu bezonas zorgi; la manĝaĵo estos unukvalita kaj konante la restoracion, ni ankaŭ certas, ke la kongresanaj stomakoj sentos sin bonfartaj; por la programo nur unu indiko estos al ni sufiĉa: neforgesebla!

Alia konsidero igis nin zorgi pri ekstreme bona programo; la venanta I.J.K. estos la deka kongreso de T.E.J.O. Tiun fakton ni volas festi ĉisomere en amasa kongreso per speciale festa programo. Ni komisiis al unu el la L.O.K.anoj okupi sin ekskluzive pri la programo kaj ĉar li estas artisto ĉe la Nederlanda Radio Unio, la festoj estas ĉe li en bonaj manoj. Mi ne volas malkovri al vi la multajn surprizojn, kiujn li preparas, sufiĉas diri, ke li recivis jam kunlaboron de la Nederlanda Radio Unio kaj la internacie konata entrepreno Philips. Kiam ni renkontis lin, ni ne povas fariĝi ne-entuziasmaj, li parolas pri baleto, orkestro de 40 personoj, kanthoro, kabaretartistoj kaj ĉu-mi-scias-kion-pli.

KAJ PRI HILVERSUM

mi povus verki longegan artikolon. Jam en marta L.J.V. mi provis doni al vi impreson pri nia kongresurbo, sed mi ne hontas konfesi, ke mia artikolo estas nur provo. Vi sciu, ke mi estas denaske Amsterdam-ano kaj la enloĝantoj de Amsterdam estas en Nederlando konataj pri sia ŝovinismo rilate sian urbon. Preskaŭ dudek jarojn mi loĝis en Amsterdam kaj fieris pri tio, ĉar Amsterdam estas belega urbo. Kiam, antaŭ nur unu jaro, mi devis transloĝi al Hilversum mi ege grumblis pri tio kaj nur kontraŭvole mi forlasis mian naskiĝurbon. Post unu jaro tamen mia opinio pri Hilversum tute ŝanĝiĝis, mi ne nur sentas min

hejme ĉi tie, sed mi fariĝis pri Hilversum preskaŭ same ŝovinisma kiel antaŭe pri Amsterdam.

Jes, Hilversum estas vere bela urbo kaj la fotoj, presitaj en ĉi tiu numero de L.J.V., eble konvinkos vin pri la praveco de tiu aserto. Sed ankaŭ ekster Hilversum vi povas multon ĝui, mi nomu ekzemple Soestdijk, kie situas la Reĝa Palaco, Baarn kaj Laren, belegaj vilaĝoj kaj preferataj loĝejoj de multege da pentristoj, kaj Loosdrecht, centro de akvosporto en admirinda, lagoriĉa regiono. Kaj se vi serĉas ripozon en la soleco de la naturo, mi invitas vin fari promenadojn en la vastaj arbaroj kaj erikejoj, kiuj ĉirkaŭas Hilversum kaj enhavas multajn riĉaĵojn por la naturesploranto. Kaj kompreneble vi deziras ankaŭ konstati, kial ni nomas Hilversum la radiourbo de Nederlando.

## LA RADIO

ludas tre gravan rolon en la ĉiutaga vivo de Hilversum. Nenie oni vidas tiom da muzikistoj kiom ĉi tie, kaj dum la unua tempo de mia restado ĉi tie mi ofte mire rigardis la multajn biciklantojn, portante iun muzikilon. Personojn, kiujn mi konis nur kiel nomojn el la radioprogramo, mi renkontis ĉi tie, nomojn de famaj orkestrogvidantoj kaj solistoj mi vidis sur ordinaraj nomŝildoj sur la dompordoj.

Loĝante iom da tempo en ĉi tiu muzikala medio, mi jam alkutimiĝis. Kelkfoje ankaŭ mi vizitis la elsendejojn kaj mi devas konfesi, ke ili restos ĉiam novaj por mi. Ne havante ajnan komprenon pri tekniko, la elsendejoj restos por mi konstruaĵoj plenaj je mirakloj kaj eĉ mia kelkfoja partopreno al radioelsendoj ne povis forigi tiun admiron. Mi ne provos en ĉi tiu artikolo priskribi al vi la internon de tiuj konstruaĵoj, venu vi mem al Hilversum, tiam vi dum la T.E.J.O. kongreso havos okazon fari ekskurson al unu el la plej modernaj elsendejoj de Eŭropo.

## LA EKSKURSOJ

meritas apartan mencion en ĉi tiu artikolo. Ni planis kelkajn ekskursojn en Hilversum por montri nian urbon al vi, i.a. ni gvidos vin al radiostacioj (vidu supre) kaj al la merkreda foiro. Duontagan ekskurson ni planis al Amsterdam. Mi tuj konsentas la rimarkigon, ke duona tago malsufiĉas por rigardi Amsterdam, sed por tion bone fari oni bezonas pli da tempo ol ni havos dum la tuta kongreso. Veninte en Amsterdam, ni disiĝos en kelkaj grupoj kiuj havos diversajn celojn, antaŭe ni informos vin kaj vi povos sciigi al ni vian preferon.

Kompreneble unu tuttaga ekskurso trovis lokon en la programo, ĝi kondukos al la havenurbo Rotterdam kaj poste al Den Haag, la sidejo de la nederlanda registraro kaj Scheveningen, kie ni vizitos la marbordon, ĉe Den Haag ni vizitos la miniaturan urbeton Madurodam, kie vi povas admiri kompletan urbon en miniatura stilo, unika en la mondo. La ekskurson ni faros per komfortaj aŭtomobiloj kaj la vojo estas tiel elektita, ke ĝi donos al vi daŭre aliajn bildojn.

## KAJ NUN PRI LA MONO

Jes, mi povas senfine rakontadi pri la kongreso, sed ni venu al konkretaj faktoj. Se oni volas partopreni kongreson, tio ne signifas, ke oni ankaŭ povas. Precipe la mono ludas gravan rolon.

Vi jam legis en ĉi tiu artikolo, ke L.O.K. de pluraj flankoj ricevis konsiderindan kunlaboron, kaj tio re-

flektiĝos en la prezoj. *Ni sukcesis fiksi prezon, kiu estas proksimume 15 guldenojn malpli alta ol tiu de la kongreso en Wörgl.* Unuavide la kostoj eble ŝajnas iom altaj, sed vi bone atentu, ke la de ni donitaj prezoj enkluzivas ĉion ajn. Krom la mono por la kongreso vi nur bezonos iom da poŝmono, do vi ne bezonos aparte pagi ekskursojn, festvesperojn, dormadon aŭ kion ajn.

Mi ripetas ĉi sube la prezojn de la kongreso *(do ĉio enkalkulita).*

| | |
|---|---|
| Por T.E.J.O. membroj ĉe aliĝo antaŭ 15/5-'54a | gld. 55.— |
| Por T.E.J.O. membroj ĉe aliĝo post 15/5-'54a | gld. 57.50 |
| Por ne-membroj ĉe aliĝo antaŭ 15/5-'54a | gld. 60.— |
| Por ne-membroj ĉe aliĝo post 15/5-'54. | gld. 62.50 |

Atentu: Se vi ne deziras partopreni la tuttagan ekskurson, vi pagas *kvin guldenojn* malpli, ĉe nepartopreno de la ekskurso al Amsterdam vi povas subtrahi *unu guldenon.*

## KIEL VI DEVAS ALIĜI?

Mi kredas, ke vi ja plene konvinkiĝis, ke la venontan kongreson de T.E.J.O. vi nepre ĉeestu. *Ni garantias al ĉiu, ke li ,aŭ ŝi) poste bedaŭros, kiam li ne partoprenis la dekan I.J.K.* Do senprokraste plenigu la aliĝilon, kiu troviĝas en decembra/januara L.J.V.

Sendu vian aliĝilon tuj al via landa peranto, se vi ne loĝas en Germanio, Francio aŭ Nederlando. *Samtempe forsendu la aliĝmonon, kiu sumiĝas por ĉiuj gld. 20.—.* Landaj perantoj regule t rasendu aliĝilojn kaj aliĝmonon al L.O.K.!

La membroj en Germanio, Francio kaj Nederlando sendu aliĝilon kaj aliĝmonon rekte al L.O.K., Lobeliastraat 4, Hilversum, Nederlando. La monon vi povas havigi al ni pere de nia bankkonto: Nederlandse Handel Mij, Agentschap Hilversum, konto je la nomo de J. Jorksveld, kasisto 10a Internacia Esperanto Junularkonrgeso de T.E.J.O. Nederlandanoj povas ankaŭ uzi la ĝirkonton n.ro 328.587 kaj menciu sur la ,bij"slipo: „Ten bate van J. Jorksveld, penningmeester 10e Internationale Esperanto Jeugdcongres van T.E.J.O."

## EKVIVALENTO DE LA ALIĜKOSTOJ

Jen listo de la egalvaloro de la aliĝkostoj en fremdaj valutoj. Tiel vi do precize povas kontroli, kiom vi devas antaŭpagi:

Anglujo £ 2.3.-; Aŭstrujo ŝilingoj 150.-; Belgujo belgaj frankoj 290.-; Danujo danaj kronoj 41.-; Finnlando finnaj markoj 2.050.-; Francujo francaj frankoj 2.100.-; Germanujo germanmarkoj 24.40; Hispanujo pesetoj 250.-; Italujo liroj 3.500.-; Jugoslavujo dinaroj 1950.-; Portugalo escudoj 168.-; Svedujo svedaj kronoj 31.-; Svisujo svisaj frankoj 25.-.

En aliaj landoj oni povas pagi ĉu per unu el suprenomitaj valutoj, ĉu per nederlandaj guldenoj, ĉu per usonaj dolaroj ($ 5.85).

## KIUJ ĈEESTOS LA KONGRESON!

Jen grava demando! ĉiujare multaj junuloj venas al la I.J.K. de T.E.J.O. kaj interamikiĝas, kaj ĉiujare ili promesas unu la alian „sekvontan jaron mi certe partoprenos". Ili faras tiun promeson facile, ĉar ili troviĝas ja ankoraŭ en la sfero de kongreso kaj estas influataj de multaj belaj impresoj de ĝojo kaj amikeco. Tamen montriĝas, ke la plejmulto ne povas realigi sian faritan promeson.


Sed, kara amiko, ĉu via parto-

preno dependu de la ĉeesto de iu persono? Tio ja estas sencencaĵo. Sendube, jes, mi garantias tion al vi, ĉeestos multaj partoprenintoj de Wörgl, le memoro al la tie pasitaj tagoj instigos ilin aliĝi ankaŭ al Hilversum. Sendube, kaj ankaŭ tion mi kuraĝas garantii al vi, ĉeestos ree konataj personoj el T.E.J.O. Kaj sendube ĉeestos multaj junuloj, kiujn vi ĝis nun ankoraŭ ne renkontis. Sed ĉu ni timu amikiĝi kun ili? Ja ĉiujare aperas novuloj, kiuj en kelkaj horoj adaptiĝas al nia granda kongresa familio.

Ni ne volas publikigi la unuan liston de aliĝintoj, tion ni faros en maja L.J.V. Se ni farus tion, sendube vi dirus: „He jen, ankaŭ li aŭ ŝi! Do nepre ankaŭ mi ĉeestu." Do, kara amiko, forŝovu vian heziton! PLENIGU NUN BALDAŬ VIAN ALIĜILON KAJ SENDU ĜIN SENPROKRASTE AL NI ĈAR ANKAŬ AL VI NI DIRAS:

KORAN BONVENON EN HILVERSUM,
LA URBO DE NIA DEKA I.J.K.!!

Roel Kraefft, sekr. LOK.



*Radio-elsendejo de AVRO.*

(Afable disp. de V.V.V. Hilversum).


## INTERNACIA FERIO-SEMAJNO 1954

okazos 24-30 Julion en Konstanz. Interesa kultura kaj turisma programo. Ekskursoj al Aŭstrujo kaj Svislando. Perfektiga kurso. Petu invitilon ĉe: IFS Esperanto, Konstanz, Grüngang 8, Germanujo.

# la burĝono



MONATA ORGANO
POR LA ASPIRANTAJ ANOJ

## La malgranda nigra kato.

Barbara Roberts.

Mario kaj ŝia frato Johano loĝas en bela dometo en la kamparo. Ĝi estas tre bela kaj la infanetoj estas tre feliĉaj. Mario kaj Johano havas multajn dombestojn, sed ili plej preferas malgrandan nigran katon. Ĝia nomo estas „Pussy" kaj Mario multe amas Pussy.

Pussy estas tre feliĉa kato kaj ĝi estas tre malbona. Ĝi ludas en la hejmo per la pilko da lano de Mario kaj la granda pilko de Johano.

Pussy havas subtason da lakto. Ĝi trinkas la lakton kun ĝuo. Ĝi havas rubandon ĉirkaŭ sia kolo. La rubando estas tre bela kaj ruĝa. Estas sonorilo sur la rubando. Kiam Pussy ludas, la malgranda sonorilo gaje tintas.

Unu tagon, kiam la suno bele brilis, Mario iris al la butiko por aĉeti lakton por Pussy. Kiam ŝi venis hejmen, ŝi vidis Pussy nenie.

Mario kriis „Pussy, Pussy!" Sed Pussy ne venis. Do Mario estis tre malfeliĉa kaj ŝi ploris tre multe.

Ankaŭ Johano serĉis Pussy-n, eĉ dum la tuta nokto, sed li trovis la katon nenie.

Du tagojn poste iris Mario al la ilejo. Tie en la angulo en la lavkorbo kuŝis Pussy kun kvin malgrandaj nigraj katidoj. Pussy tintis sian sonorileton feliĉ. Ĝi rigardis al Mario kun fiero. Mario krias pro ĝojo kaj ankaŭ ŝi estas tre feliĉa.

Johano portas Pussy-n kaj la katidojn en la domon kaj nun ili loĝas feliĉe.

## La printempo.

La vintro pasis. Sur la kampoj kaj en la stratoj ne plu estas neĝo. La vento ne plu blovas tiom forte.


La suno brilas gaje. La herbejo denove estas verda. Inter la herboj ekkreskas malgrandaj floretoj. Ili gaje ridas al la suno.

Multaj migro-birdoj revenas el la sudo.

La hirundoj riparas siajn nestojn. La hirundino baldaŭ kovos la ovetojn .

La infanoj ĝojas al la printempo. Ili ne plu devas porti la varmajn vestojn. La stratoj estas bruaj pro la infankrioj.

Ankaŭ la Pasko-festoj estas dum la printempo. Tiam la pasko-leporo alportas por la bonaj infanoj pasko-ovojn. Ĝi kaŝas la ovojn en la domo kaj ekster la domo en la ĝardeno. La infanoj volonte serĉas la bele kolorigitajn ovojn.



*Fabritius-lernejo.*

(Afable disp. de V.V.V. Hilversum

## KORESPOND-ADRESOJ

*Ĉiu abonanto, aŭ grupo foje po jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.*

**Francujo:** 10 gelernantoj 15-18 jaraj dez. kor. kun samaĝaj alilandanoj. Skribu al Sro Louis Chasseriaud, profesoro, Esperanto Grupo, Collège de ROYAN, Ch. M.
Dolores Roche, Cité Rocher, D, 2, Cenon, (Vienne) 15 j. hispana f-ino dez. kor. kun ĉiuj landoj.
Claudie Trinquet, Cité Rocher, B, 1. Cenon (Vienne), 16 j. f-ino, dez. kor. kun ĉiuj landoj.

**Nederlando:** Kiu povas sendi al S-ino E. v. Veenendaal, Limmen (N.H.) ĉiujn nrojn de LJV aperintaj post la milito? Ŝi rekompencas per libroj. Bv. antaŭe skribi.